
# Ĵus vekiĝinte, ŝi

*komence poste fine…*



1. *brosas siajn dentojn dum almenaŭ tri minutoj*
2. *skrapas sian dorson kontraŭ la litopilaroj*
3. *streĉas sin, ridetante al la spegulo*
4. *ĝuas "skotan duŝon": varmegan-malvarmegan-varmegan…*
5. *forigas la kromajn brovharojn, ruĝigas siajn lipojn per ruĵo kaj parfumas sin per la numero 5 de Dior*
6. *senvestiĝas por revestiĝi*
7. *surmetas siajn pantoflojn kaj ŝalon kaj iras eksteren rigardi kia vetero estas*
8. *nutras siajn katon, hundon, kanarion, oran fiŝon kaj edzon*
9. *lavas al si la nazpinton kaj sekigadas sin per granda bantuko*
10. *malfermas la okulojn kaj tuj refermas ilin kun hororkriego*
11. *trinkas grandan glason da minerala akvo por bone komenci la tagon*
12. *ekŝaltas la radion por ĝojiĝi pro la trafikvicoj en kiuj ŝi ne estas*
13. *malŝaltas la vekhorloĝon per trafenestra forĵetado*
14. *iras preni la gazeton de sur la pordosojlo kaj matenmanĝas enlite*
15. *rigardas sian brakhorloĝon, supertiras la ŝultrojn kaj kriaĉas al la hamstro*
16. *preparas freŝan oranĝsukon por sia amanto*
17. *saltas en sian pantalonon kaj ekkuregas al sia laboro*
18. *konsultas sian agendon por vidi ĉu eblas prokrasti siajn rendevuojn*
19. *ordigas sian liton kiel ŝia panjo instruis al ŝi*
20. *kombas sian longan bukloharon kaj nodas en ĝin rozkoloran rubandon*
21. *frotadas siajn okulojn kaj oscedegas*
22. *reiras trifoje en sian liton*
23. *dancas sambon sur la kuireja tablo*
24. *vekas la infanojn per granda sitelo da glaciakvo*
25. *detale priskribas siajn sonĝojn en sia tagĵurnalo*
26. *dum duonhoro zorge elektadas siajn vestaĵojn*
27. *skribas letereton por la laktvendisto kaj enŝovas ĝin sub la sojltapiŝon*
28. *fluigas al si varman banakvon kaj solvas en ĝi vortkrucenigmojn*
29. *rapide purigetas sian vizaĝon kaj preparas la matenmanĝon por la tuta kvartalo*
30. *turnas sin trifoje en sia lito*
31. *matengimnastikas kun fortega rokmuziko*
32. *………*

***Kiel mi uzas la ekzercon:***

1. *antaŭ disdoni la folion, elektigu al ĉiu partoprenanto sekretan serion de 3 nombroj inter 1 kaj 31 (ekzemple 6, 25, 21)*
2. *disdonu la paperojn kaj rapide tralegu kun ili por certiĝi, ke ĉiu komprenas la frazojn (ne eniru longajn klarigojn, sed mimu aŭ montrigu de la aliaj)*
3. *poste ĉiu mimas laŭvice 'sian' vekiĝon, laŭ la de si elektata nombroserio*
4. *la aliaj provas priskribi tion, kio okazas, komencante per 'komence, ŝi...'*
5. *kompreneble, se estas viro la mimanto, la publiko devas adapti la frazojn...*
6. *oni povas modifi la rakontadon per la sekvaj frazokomencoj:*

*Kiam ŝi estis sesjara….…….*

*aŭ*

*Kiam ŝi estos sepdeksep ………...*